

parazitismo = vivmaniero, en kiu unu el la partneroj (la parazito) profitas, sed la alia (la gastiganto) ne ricevas iun ajn profiton, eĉ suferas pro la ĉeesto, damaĝiĝas. La gastiganto tamen evoluigas certan kontraŭparazitan toleremon. Ankaŭ la parazito adaptiĝas al la metabolo de la gastiganto, sed pro tio ofte perdas la forton, malsaniĝas;

parazitizo = malsano kaŭzata de parazitaj;

zoonozo³ = reciproka infekto inter besto kaj homo, t.e. homa malsano el animala (vertebrula) fonto, resp. besta infekto el homa fonto;

periodaj (tempaj) parazitaj – vizitas la gastiganton nur por certa pli aŭ malpli longa tempo, ekz. por nutri sin per sangosuĉado;

permanentaj (daŭraj, konstantaj) parazitaj – vivas sian tutan vivon sur aŭ en la gastiganta korpo;

hazarda parazito – vivas parazite post hazarda renkontiĝo kun hazarda gastiganto;

deviga parazito – ne povas ekzisti sen tiu ĉi gastiganto;

okaza parazito – atakas resp. uzas nenormalan gastiganton;

migra parazito – trovas vivejon sur (aŭ en) por ĝi netaŭga gastiganto (ĝi mem ofte mortas, sed ankaŭ povas kaŭzi malsanon al la netaŭga gastiganto).

fina (definitiva) gastiganto: gastigas la plenkreksan (adoltan, seksmaturan) vivostadion de la parazito;

intera gastiganto – gastigas la interajn (larvaj, fruevoluajn) parazitajn stadiojn: ĝi estas gastiganto inter du sinsekvaj evolustadioj;

(piednote: En **homa parazitizo** la homo rolas ĝenerale kiel fina gastiganto. Gravaj esceptoj estas ekz. malario kaj hidatidozo: en ambaŭ evolucikloj de la parazitoj la homo estas (mort-endanĝerita) **intera gastiganto**. Kelkaj parazitolarvoj bezonas por sia pluevoluado du aŭ plurajn malsamajn gastigantojn: ili konforme nomiĝas **unua intera gastiganto**, **dua intera gastiganto** kaj tiel plu.

Adreso de la aŭtoro

Prof. Dr. R. Sachs

Vor dem Brückentor 3

DE – 37269 – Eschwege / Germanio

<IsaeSachs@aol.com>

Priaŭtoro informo

Veterinara. Profesoro pri parazitologio. Speciala fakkampo: tropikaj malsanoj kaj parazitizoj de sovaĝbestoj.

³ "zoonozo" – ne en PIV, sed ja trovebla ĉe *Hřadil* (1979): "Esperanta Medicina Terminaro", eldonita de Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA).

Recenzo

Rezenzo pri la libro

"Sociaj novenkondukaĵoj en kultura proceso: strategioj de evoluo kaj transformado" ⁽¹⁾

La du-voluma eldonaĵo enhavas prelegojn kaj artikolojn de la kontribuintoj de la samtitola scienc-praktika konferenco, okazinta en Samara (Rusio), la 9-an kaj 10-an de decembro 2004. La forumo pri tiu ĉi aktuala temo estis kunorganizita de pluraj institucioj: Samara Filio de Moskva Ŝtata Universitato de Servoj, Internacia Kulturologia Societo "Artefakto – Kultura Diverseco", Regiona Centro de Internacia Komisiono pri Urĝaj Antropologiaj Esploroj, Tutmonda Arkeologia Kongreso, Samara Komitato de Eŭropa Asocio "United for Intercultural Action", Samara Centro de UNESKO, Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro (Samarkando, Uzbekio), Samara Scienca Centro de Rusia Akademio de Sciencoj.

En la materialoj de la konferenco trovis siajn reeĥojn intensaj transformoj, okazantaj en la mondo, plejparte en Eŭropo (formiĝo de Eŭropa Unio, disfalo de USSR, apero de novaj sendependaj ŝtatoj sur postsovetiaj teritorioj), kio provokas kulturajn ŝanĝojn kaj akompanas aperon de novenkondukaĵoj en ĉiuj sferoj de homa agado.

La libro ampleksas vastan temaron kaj unuigas sperton de diversfakaj aŭtoroj, esplorantaj la kampon de ŝanĝoj kaj dinamisman evoluon, ŝanĝojn en la socio kaj kulturo. La artikoloj enhavas filozofiajn, antropologiajn, soci-politikajn, pedagogiajn, jurajn novenkondukaĵojn en kultura sistemo. La kontribuintoj pritraktas kaj proponas novenkondukajn ŝanĝojn en edukado, turismo, servoj, ekonomio kaj justico.

En la unua volumo de la libro estis publikigitaj 35 artikoloj el 12 landoj de Eŭropo, Azio, Aŭstralio kaj Afriko. La artikolaro enhavas enkondukon kaj kvin ĉapitrojn:

(1) "Social' nye innovacii v kulturnom processe". Ĝenerala redaktoro: A.V. Malafejev. Scienca redaktoro: V.I. Ionesov. Eldonejo de Samara Scienca Centro de Rusia Akademio de Sciencoj. *Samara 2005*, 528 p. ISBN 5-93424-193-1

- Paradigmoj de kulturaj ŝanĝoj;
- Tradicioj kaj novenkondukaĵoj en kultura proceso: diskurso pri historia-antropologia kompreniĝo;
- Novenkondukaĵoj kaj sinsekveco en socia-politika historio de jura penso;
- Ideoj de paco kaj toleremo en kultura proceso;
- Novenkondukaĵoj en soci-kultura manaĝerado, servoj kaj edukado.

Plenriĉa temaro de la artikolaro estas komprenebla, ĉar la konferenco aranĝis pluraj organizaĵoj kaj aŭtoroj, kiuj ĉiufanke prilumis kulturen agadon ekde arĥeologia modeligo de etnokulturaj procesoj en okcidenta Siberio ĝis la esploro de germana social-demokratio fine de la 19-a jarcento kaj uzado de tradiciaj konoj en sistemo de socia administrado en Niĝerio. Oni pritraktas ankaŭ historiajn kaj nuntempajn formojn de interagadoj de tradiciaĵoj kaj novenkondukaĵoj en kultura vivo sur ĉiuj kontinentoj de nia planedo.

En la dua volumo de la konferencaj materialoj oni publikigas 38 diverstemajn artikolojn sub kvar ĉapitroj:

- socialaj-filozofiaj aspektoj de kultura evoluo kaj transformoj;
- tradiciaĵoj kaj novenkondukaĵoj en kultura-historia proceso;
- novenkondukaĵoj kaj sinsekveco en sociala-politika historio;
- novenkondukaĵoj en sociala-kultura manaĝerado de servoj kaj edukado.

La dua volumo estas dediĉita plejparte al la Rusia kulturo, ĝiaj transformoj dum aktivaj soci-historiaj ŝanĝoj, krizaj periodoj kaj nuntempaj problemoj en konstruado de la nova socio kaj kulturo.

Oni certe povas antaŭvidi, ke la materialoj de la konferenco servos kiel fundamento por estontaj gravaj paŝoj dum formado de nia teoria kaj praktika pensado en la sfero de kulturaj novenkondukaĵoj, por difini direktojn de evoluo de kulturaj fenomenoj kiel interne de apartaj naciaj kulturoj tiel ankaŭ en interkultura monda spaco.

Adreso de la recenzinto

D-ro Vladimir Ju. SCHOTKIN

Beruni ko'chasi, 31/ 50

UZ – 140050 Samarkand / UZBEKIO

Tel. +998 (66) 229 13 01 <holikmam@mail.ru>

Scienca ĉio

Fakidiotoj tamen postvivas

Kompari formikan ŝtaton kun homa ŝtato estas granda tento. Verdire formikoj ja estas ĝardenistoj – kiuj sur memhakitaj folioj bredas fungojn, brutbredistoj – kiuj tenadas foliolaŭsojn, konkerantoj – kiuj subjugigas aliajn popolojn, kaj multe pli da tio kio konformas kun homaj kondutoj. Antaŭ ĉio la formikoj estas ekstreme batalemaj. Iu specio, la amazona formiko *Polyergus rufescens*, sin tiom dediĉas al militado, ke ĝi pro tio iom post iom perdis ĉiujn aliajn ecojn kaj vivkapablojn. Kaj tiel la amazon-formikoj specialiĝis al sklav-ĉasado por rekrutigi personaron por nestfarado kaj kovflegado – laboroj, por kiuj ili ne plu kapablas. Ĉar iliaj kapoj eĉ ne plu taŭgas por mem-manĝado. Ili do ankaŭ bezonas sklavojn por sin nutrigi. Alie ili ja mortus pro malsato. (Ĉi tie certe finiĝas ĉiuj komparoj).

(2007-07-31)

La unua sangoprem-mezurado

En la jaro 1726 *Stephen Hales* (1677-1761), natursciencisto interesita brita ekleziulo, faris decidan eksperimenton por determini la sangoprem: li enmetis en la arterion de ĉevalino latunan kondukilon, kiu estis konektita kun 3-metrojn alta vitrotubo. En tiu videblis, kiel la sango laŭ korbato altiĝis ĝis 2 metroj kaj reen falis. Poste, en 1881, la viena privatdocento *Samuel Siegfried Karl Ritter von Basch* (1837-1905) prezentis la unuan ilon, per kiu oni povis ne-sange mezuri la sangoprem – laŭ la pulsobato. Ankoraŭ post la sekva jarcentoŝanĝo tamen multaj kuracistoj konsideris la sangoprem kiel mezuron de la kor-povo kaj ne de la kor-laboro. Sekve de tio, kun alta sangopremo oni vere “ŝvelis pro saneco”. Tiuj tempoj bedaŭrinde forpasis...

(2007-07-10)

Tri-arbo-veneno

La brita marveturisto *Sir Walter Raleigh* (ĉ. 1554-1618) ne nur kunportis al Eŭropo la tabakon, sed ankaŭ la kuraro-venenon. Li observis en la pluvarbaro de Gujano, kiel simio – trafita de sago de indiĝeno – ekkriis, saltis sur proksiman arbon, atingis ankoraŭ pluan arbon, kaj poste morta falis surteren. La uzitan sagovenenon la indianoj nomis “tri-arbo-veneno”. La pli fortaj variantoj estis la “du-arbo-veneno” kaj la “unu-arbo-veneno”. *Raleigh* kunprenis ekzempleron de la “kurari”-nomata miksaĵo, kies aktiva komponanto konsistis el plantopartoj de la liano-specio *Chondodendron tomentosum*, ankaŭ nomata “tubo-kuraro”. Medicinistoj malkovris la muskolar-malstreĉan efikon de la kuraro nur 200 jarojn poste. La simio ĝin spertis ĉe la tria arbo.

(2007-07-03)